

JUDA-KRISTANA PATRO NIA

(Mat 6, 9 13)

La preĝo *Patro nia* en la formo, kiun ni konas, troviĝas en Evangelio laŭ sankta Mateo, en la centro de la prediko de Jesuo sur la montopinto (Mat 5 7). Post kiam Jesuo avertas antaŭ hipokriteco dum preĝado, Li donas al ni la preĝon kiel modelon. En la menciita kunteksto estas klare, ke la preĝo **Patro nia** ne estas al ni donita kiel certa “ĝusta” vorta formulo, ja la formo en la Evangelio laŭ sankta Luko diferencas, sed kiel normo de nia sinteno al Dio, kun kiu devintus ĉiu nia preĝo konfronti sin.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo

Nekopreneblan, ĉieregantian Dion Kreinton Jesuo titolas kiel Patron, precize tiel, kiel Li Lin nomas Patro multfoje dum sia instruado. Jam en Deuteronomio (32, 6) kaj ĉe la profeto Jesaja estas Dio, JHWH, signita kiel Patro de Israelo. Rekte per la vorto *Patro nia* turnas sin al Dio *tefila* (ankaŭ nomata *18 benoj*), ĉiutaga preĝo uzata jam en la tempo de Jesuo en sinagogo eĉ private. Jesuo elektas tiun ĉi titolon, ĉar verŝajne plej bone prezentas lian rialton al Dio, al kiu Li volas inviti ankaŭ nin.

Se ni rajtas Dion titoli *Patro*, tio signifas, ke Dio estas pro ni iu tre proksima. Li amas nin kaj zorgas pri ni kiel patro, kaj ni povas al Li kiel al patro fidi kaj esti je Li liberige dependaj kiel liaj gefiloj. Nomi Dion Patro signifas konsciiĝi, ke ni havas nian originon en liaj manoj kaj ni estas liaj gefiloj. Tio estas pli multe ol ia difino danke al la donaco de Sankta Spirito ni denove naskiĝas el Dio kaj ni ricevas Spiriton de fileco de Jesuo, kiu en ni vokas *Patro* kaj tiel Li nin malfermas al la intima rilato al Dio. Tiu ĉi belega fakto estas ankaŭ devontliga, ja, se ni sentas sin gefiloj de Dio, per nia vivo ni montras al la mondo la bildon de Dio, bedaŭrinte ofte tre deformitan (komp. 1Joh 3, 9 10).

La pronomo *nia* donas al la alparolo de Dio kolektivian karakteron. “Vi diras *nia*, tial rigardu ĉiujn kiel gefratojn, gefilojn de unu Patro” (Theofylakt). La rilato al Dio ne eblas redukti al unu dimensio *mi* kaj *vi*.

La titolo de Dio Patro estas pliprecizigita per la vortoj *kiu estas en la ĉielo*. Tiuj esprimas, ke Dio estas sankta, diferenca de ni, Li alte superigas nian mondon kaj nian pensadon. Tio ne kontraŭdiras lian proksimecon al la homo, male, lia proksimeco estas ĝuste pro tio proksimeco profunda kaj transformanta.

Turnadi sin al la Patro en la ĉielo signifas ankaŭ konfesi, ke ĉielo estas por ni patra hejmo. *Se vi volas, ke Dio estu via Patro, rigardu la ĉielon kiel vian hejmon* (Theofylakt). Sian preĝon ni devintas komenci per rigardo supren, tuŝi unue la veron kaj sanktecon kaj voki, ke la ĉielo descendu sur la teron. La preĝo *Patro nia* respektas tiun ĉi principon kaj post la enkonduka alparolo daŭrigas per serio de tri *vipetoj* en la sama spirito. Ilia direktiĝo el la ĉielo sur la teron estas fine konfirmita per la vortoj *kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero*.

Sanktigata estu via nomo

Tiu ĉi peto havas sian paralelon en la fermo de la sinagoga diservo, en la preĝo *Qaddis*: *Fariĝu granda kaj sankta lia granda nomo en la mondo, kiun Li kreis laŭ sia volo*. Simile en jam menciita *tefila* oni konfesas: *Ni sanktigados vian nomon en tiu ĉi mondo tiel, kiel ĝi estas sanktigata en la ĉielo*.

Ĉarman kaj eble la plej ĝustan klarigon de tiu ĉi peto ni trovos ĉe la profeto Jeĥezkel (36, 23n): *Denove mi sanktigos mian grandan nomon, malsanktigitan inter paganaj nacioj, kiun vi malsanktigitis inter ili; la nacioj ekscios, ke mi estas JHWH, kiam mi montrus sur vi mian sanktecon antaŭ iliaj*

okuloj. Ni povas rimarki kelkajn gravajn punktojn. En la unua kazo, mem la Dio estas tiu, kiu sanktigos sian nomon. Ni mem, sen Li, kapablas nur malsanktigi ĝin. Tial per tiu ĉi peto ni vokas al Dio, por ke Li mem lasu sin ekkoni al la mondo tia, kia Li vere estas, ke Li montru sian sanktecon kaj plenigu per ĝi la teron. Ni volas, ke Dio havu *bonan nomon* en la mondo tiel, kiel Li havas ĝin en la ĉielo.

Grava estas la maniero, kiel tio fariĝu. La mondo ekkonos la sanktecon de Dio, kiam ĝi ekvidos respegulon de lia sankteco je tiuj, kiuj estas nomataj liaj gefiloj. Johano la Orbuŝa tial parafranzas tiun ĉi peton per la vortoj: *Ankaŭ en mi montriĝu via sankteco, ke homoj vidu miajn bonajn agojn kaj adoru Patron en la ĉielo* (komp. Mat 5, 16). Paradokse ni venas al la demando, kiel ni povas sanktigi Dian nomon. Judaj instruistoj donas respondon. Kiu estas fidela al Dia volo kaj preferas ĝin antaŭ sia volo, tiu sanktigas lian nomon. Supro de tiu ĉi sinteno estas oferi vivon por Dia nomo. Tiel Jesuo per sia morto unikmaniere glorigis sian Patron (komp. Th 17, 1 26).

Venu via regno

Ni aŭdas ĉi tie peton el la preĝo *Qaddiŝ*: *Venu lia regno dum via vivo kaj viaj tagoj, dum tempo de la domo de Israelo, rapide kaj en mallonga tempo. Diru: Amen.* Se ni vortigas tiun ĉi peton, ni konscias, ke ankoraŭ ni ne estas ĉe la celo. Dia regno venas kaj ni spertas ĝin, sed ankoraŭ ĉi ne kulminis. La eklezio, lia fermentaĵo en la mondo, sopiras pri la pleniĝo. Ni sopiras pri la dua alveno de Kristo, sed tiu venas jam nun, do tiu ĉi peto tute ne estas ia pasiva atendado de *fino*, ĝi estas sopiro, ke jam ĉi tie kaj nun Dio komencu regi.

Dia regno, regado de Dio, efektivigaĵo tie kaj tiam, se Dio estas akceptata kiel reganto, kaj kiel reganto Li ĉeestas kaj certigas sian

ordon. Por tio ne sufiĉas nura Dia ĉeesto, estas necese, ke ni homoj transformiĝu kaj tiel ni estu kapablaj akcepti Dian regadon en ni. Estas tio nur de alia flanko rigardata sanktigo de Dia nomo per nia sankteco, tial ni denove povas preni klarigon far la profeto Jeĥezkel: *Kaj mi donos al vi koron novan kaj spiriton novan mi metos en vin... Mi faros, ke vi agados laŭ miaj leĝoj kaj mian ordonon vi observados kaj plenumados* (Jeĥ 36, 26 27).

Dia venko signifas samtempe malvenkon de tio, kio al ĝi kontraŭas. Johano la Orbuŝa klarigas: *Ni estas kvazaŭ urbo ĉirkaŭita de malamikoj de niaj pekoj kaj malbonaj pensoj. Ni petas, ke venu reĝa armeo kaj liberigu nin, ke venu Dio liberigi nin de niaj pekoj.*

Fariĝu via volo

Tiu ĉi peto estas pliprecizigo kaj klarigo de la antaŭa. Dia regno estas tie, kie plenumiĝas Dia volo. Petante pri Dia regno ni vokas al Dio, ke Li efektivigu sur la tero sian volon kaj faru el la tero la ĉielon. Tio ne estas esprimo de pasiva rezigno de homo en koncerna situacio, kiel estas tiu ĉi peto ofte erare komprenata, male, tio povas esti *batalkrio* pri Dia interveno tiam, kiam ne fariĝas lia volo. Ne ĉio, kio sur la tero (aŭ en nia interno) efektivigaĵo, estas Dia volo. Memkompreneble, tiu ĉi batalo okazas precipe en ni. *Instruu min plenumi vian volon, ĉar Vi estas mia Dio* (Psa 143, 10). Jesuo mem en Getsemana ĝardeno subiĝis al tiu ĉi batalo.

Ke ni povu tiel preĝi, estas necese kredi, ke la intereso de Dio estas nia bono. Sankta Paŭlo certigas nin: *Dia volo estas via sanktigo* (1 Tes 4, 3). (Ni vidas, kiel kune la unuaj tri petoj de la preĝo koneksas.) Estas ankaŭ grave scii, ke Dio ne volas forpreni nian liberecon, kiun Li al ni donacis. Li vokas nin al partnera rilato, en kiu ni interesiĝas pri lia volo, sed samtempe *La deziron de siaj respiktantoj Li plenumas* (Psa 145, 19).

Jesuo nomas kiel siajn gefratojn tiujn, kiuj plenumas Patran volon, eĉ estas tio por Li ununura kriterio de la parenceco kun Li. La peto pri efektivigo de Dia volo kaj preteco plenumi ĝin tre intime koneksas kun la titolo *Patro nia*.

Kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero

Kiel estas ordo kaj paco inter anĝeloj en la ĉielo, kie ne estas subpremantoj kaj subprematoj, ofendantoj kaj ofenditoj, tiel estu ankaŭ inter ni (Johano la Orbuŝa). Ni komencis per la rigardo al la ĉielo kaj petis pri descendo de la ĉielo teren. La vortoj *kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero* esprimas tiun direktiĝon kaj finas ĝin. Ni descendas per nia rigardo de la ĉielo teren en la sekvonta parto, en t.n. ni petoj, ni serĉos Dion de sube, en niaj bezonoj en nia mizero. Ni rigardis Dion, lian alvenantan regnon kaj nian ĉielan identecon, tial ni povas nun koncentri nian rigardon al nia malforteco, pekeco kaj endanĝereco sen tio, ke ili nin englutos.

Panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ

Ĝis hodiaŭ diskutas fakuloj, pri kia pano ni petas. La greka vorto *epiousios* permezas kelkajn tradukojn. Latina Vulgato tion tradukas *ĉiutaga* pano, en siaj komentarioj Hieronimo kaj Johano la Orbuŝa parolas en la sama senco pri *taga* pano. Estas tio simbolo por ĉiuj ĉiutagaj bezonoj. Ankaŭ pri tiaj ordinaraj aĵoj ni rajtas peti kaj per ili ni spertas Dian zorgemon. Grava estas kompletigo *hodiaŭ*. Ni petas pri tio, kion ni ĵus bezonas, sed ni ne sopiras pri certigo, kiu permesus al ni forgesi nian dependecon de Dio: *Malriĉecon kaj riĉecon ne donu al mi. Nutru min per tiom da pano, kiom mi bezonas* (Sent 30. 8).

Origenes kaj lia skolo parolas pri pano de nia *esenco, ekzisto*, simile Peŝita tradukas *bezonata* pano. Tio reprezentas ĉion, kion

ni homoj bezonas *hodiaŭ* por nia vivo. Tio enhavas niajn fizikajn bezonojn, kio respondecas al la supre menciita signifo. Apartenas ĉi tien ankaŭ anima nutraĵo, Dia vorto kaj Eŭkaristio.

La petoj el juda *tefila* pri bona rikolto kaj satigo per pano estas ofte komentataj kun aludoj je manao, el kiu povis israelidoj preni nur por unu tago (antaŭ sabato por du), alikaze ĝi putris. La peto pri taga kvanto havas sian longan historion. Se tagaj bezonoj kondukis hebreajn komentistoj al la penso pri manao, ne eblas miri, se kristanaj Patroj en la pano por *hodiaŭ* vidas plenigon de tio, kion manao bildigis: *superescan* eŭkaristian panon.

Fine la vorton *epiousios* eblas traduki ankaŭ kiel *morgaŭa*, do la pano por venonta tempo: *Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio* (Luk 14, 15). Ni petas pri baldaŭa alveno de Sinjoro, por ke ni jam hodiaŭ partoprenu en la festeno en ĉiela regno.

El ĉiuj tiuj ĉi signifoj la unuaj du verŝajne plej bone respondecas al la kunteksto de la dua parto de la preĝo *Patro nia*, sed tiuj ceteraj ankaŭ ne estas sensencaj. Ni povas ilin en tiun ĉi peton inkludi ĉiujn.

Grava estas denove la posesivo *nia*. Bezonoj de niaj gefratoj estas niaj bezonoj kaj Diaj donacoj, kiujn ni ricevas kiel respondon je niaj bezonoj, estas donacoj por *ni*. Preĝi *Patro nia* devontligas nin disdividi tion, kion ni ricevis. Finfine, ankaŭ jam menciita eŭkaristia pano estas sanktaĵo de komunumo en Kristo kaj malemo al disdivido de ĉio estas baza malhelpilo (1Kor 11, 17-34).

Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas (gr. ni pardonis) al niaj ŝuldantoj

La peto pri pardono de ŝuldoj havas sian gravan lokon en la Malnova Testamento kaj ankaŭ en aliaj judaj preĝoj. *Pardonu al ni,*

Patro nia, ĉar ni pekis, pardonu al ni, Reĝo nia, ĉar ni falis (tefila). Ni petas pri Dia pardono, per kiu ne ŝanĝas Dio sian sintenon al ni, sed ŝanĝiĝas nia sinteno al Dio: *Alkonduku nin, reen al via Leĝo, alproksimigu nin, Reĝo nia, al via servo, revenigu nin per plena pento al via ĉeesto* (tefila).

Denove ni sentas socian dimension: pardonu al ni *niajn* ŝuldojn. Ni sentas kune kun ĉiuj infanoj de nia Patro; iliaj ĝojoj, zorgoj, sed eĉ kulpoj estas ankaŭ la niaj. Ni estas invititaj veni antaŭ Dion kiel reprezentantoj kaj pastroj de la tuta homaro. Ni rajtas havi ĉeeston je Kristo, kiu portis sur si la pekon de la mondo.

Kun la peto je pardono estas intime kunigita la instigo pardoni al si reciproke. En la plej severa kompreno estas tio kondiĉo por tio, ke estu al ni pardonite (Mat 6,14 15). Se ni ne donas pardonon, ni fariĝas malkapablaj akcepti pardonon de Dio aŭ de aliaj homoj. Tion ni trovas ankaŭ en juda literaturo: *Se vi pardonos al proksimulo, Unusola pardonos al vi. Se vi al proksimulo ne pardonos, neniu vin kompatos* (Midraŝ Tanchuma Genezo, komp. Sir 28, 2).

En pli milda ekspliko temas pri simileco inter nia kaj Dia alpaŝo: en kia mezuro ni pardonas, en tia Dio pardonas al ni (Mat 7, 1 2). Ĉi tie spite tiun ĉi justan principon necesas esprimi esperon, ke Dio estas al ni tamen pli mizerikorda ol ni estis al niaj proksimuloj.

Fine eblas tiun ĉi principon turni inverse. Ĉar Dio pardonas al ni kiel la unua, ankaŭ ni devas pardoni, ni estas vokitaj sekvi Dion en lia mizerikordo al la homoj (Mat 18, 23 35).

Ne konduku nin en tenton (provojn, kaptilojn)

Tiu ĉi en semita spirito eldirita frazo, eliras el la supozo, ke Dio ĉion kontrolas, ĉio, kio okazas, faras (aŭ pardonas) Dio. Estis multaj provoj interpreti tiujn ĉi vortojn en

por ni pli proksiman lingvon: *ne donu nin je libervolo al tentoj* (ĈEP), *se ni falos en tenton, ni ne estu konsumitaj, Dio donu al ni bezonan helpon kaj paciencon, ke ni ne falu en tentojn, sed ke ni estu venkintoj* (Theofylakt). Bela ekspliko povas esti malnova peto el babilona Talmud (Ber 60b): *Ne donu nin al potenco de peko, potenco de kulpo, potenco de tento, nek al potenco de honto.*

Iuj patroj vidas ĉi tie aludon je turmentoj de lastaj tagoj. Ni devas peti pri tio, ke ili ne trovu nin nepreparitajn. Alia ekspliko limigas la vorton *tento* je tiuj provoj, kiuj superas niajn eblecojn (memkompreneble, kalkulante kun Dia helpo). Ni petas, ke Dio ne konduku nin en tentojn, en kiuj ni ne sukcesus.

Sed liberigu nin de la malbono

Simila peto estas en *tefila*: *Rapide nin liberigu, nia Reĝo pro sia gloro.* Ĉi tie estas vortigita tio, kion antaŭvidas jam la peto pri alveno de Dia regno liberigon de malamikoj de regno. En la greka originalo ne eblas distingi, ĉu estas *malbon(-o, -ulo)* en la maskla aŭ neŭtra genro. Do eblas ambaŭ signifoj: liberigo de malbono kaj ankaŭ de Malbonulo. Nun kaj ankaŭ en la tago de la lasta juĝo ni volas esti savitaj de pretendoj de la infero je ni. Ni petas, ke ni ĝuu liberecon, kiun Jesuo por ni gajnis per sia kruco kaj resurekto. Sed tio ne devas signifi sendoloran vivon. Johano la Orbuŝa kapablas tiun ĉi liberecon imagi al si eĉ en dramaj kondiĉoj: *Eĉ se mi finus kiel Job, ne donu al Malbonulo potencon super mi.*

Denove indas rimarki, ke en tiu ĉi kaj ankaŭ en la antaŭa peto sentblas socia dimensio: nin.

Ĉar via estas regno, potenco kaj gloro eterne, amen.

Ŝajnas, ke tiu ĉi ferma doksologio estas malpli frua liturgia aldono al Evangelio. Ĝia

neĉeesto en *originalo* estas nekomprenebla, ĉar ĉiu juda preĝo finiĝas per doksologio (beraĥo). Krome la preĝo *Patro nia* finita per la vorto *malbono* sonas iel strange kaj nefinite. Intuicio de origina eklezio, kiu aldonis tiun ĉi fermon, ŝajnas prudenta.

En la dua parto ni de sube, el nia mizero scendis al Dio, ni kuraĝis rigardi vid al vide niajn kulpojn, tentojn kaj malbonon, ĉar Dio, al kiu ni apartenas kaj kredas, estas reĝo kaj havas potencon super ĉio. Ferma doksologio estas plifirmigo de nia espero kaj kuraĝo peti kaj samtempe ĝi montras la celon, al kiu ni direktiĝas.

David Pancza

Literaturo:

New Jerome Biblical Commentary.

Prelegoj: de ThLic. Janoviĉ.

Di Sante: Židovská modlitba.

Theofylakt (bulgarlingve): Komentare k evangeliam.

Johano la Orbuŝa (Jan Zlatouŝtý): Komentář k modlitbě Otče náš.